



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

Notre Bulletin

Voici notre 3ème bulletin normand 1995. Nous nous efforçons d'en faire paraître régulièrement 4 numéros par an en mars, en juin, en octobre et en décembre.

Il est bon de rappeler quelques uns des **objectifs de notre bulletin** :

- créer le premier lien de l'élève avec le mouvement espérantiste
- inciter nos membres à soutenir l'Esperanto en adhérant aux associations nationales et internationales.
- donner des informations concernant les congrès et autres rencontres, concernant aussi les revues et les conditions d'abonnements.
- rendre compte des activités des groupes normands et des militants isolés.

Que faut-il éviter dans notre bulletin?

- Des articles trop longs à vocation littéraire ou technique: il existe des revues spécialisées pour cela.
- Des articles tendancieux qui pourraient "choquer" nos lecteurs; certains réclameraient un droit de réponse (qui ne paraîtrait que 3 mois plus tard) ...puis une réponse à la réponse, etc...?!

Qui doit envoyer des articles?: tous peuvent rédiger des articles. Ces articles peuvent être en français ou en espéranto, afin de ne pas rebuter les débutants.

Qui reçoit le bulletin?

- Tous les adhérents qui ont payé leur abonnement annuel
- ceux qui ont oublié de payer mais dont on connaît l'attachement à notre cause (en espérant qu'ils voudront bien réparer leur oubli)
- les nouveaux espérantistes gratuitement pendant un an
- les autres associations, fédérations régionales et groupements amis

Notre bulletin est l'organe de l'UEN mais il doit être ouvert aux autres mouvements espérantistes, d'une manière impartiale.

Il importe que notre lien demeure et je compte sur votre collaboration.

Petro KIJ O

NORMANDO EN ĈINIO

Oni ne povas diri ke la 3a Transnacieca Renkontiĝo de SAT kiu okazis dum majo en Xi'an (provinco Shaanxi, Ĉinio) organizita de nia samideano Wang Tianyi, estis plena sukceso, sed ĝi estis por mi bona preteksto por mia deka vojaĝo al tiu lando.

Se mi bone kalkulis, estis 13 ĉeestantoj, eĉ 14, se oni aldonas la bebon de iu samideanino, kaj mi ne estas certa ke ĉiuj, kiuj aperis sur la grupfoto, estis veraj esperantistoj. Ĉiamaniere, mia programo estis sufiĉe riĉa, despli ke la afero malbone komencis: kiam mi alvenis, mi ekmalsanetis pro gripo kaj mi preskaŭ bedaŭris esti entrepreninta tiun vojaĝon...

La kongreseto ne multe okupis min kaj la profesoro Li, de agrikultura universitato de Yangling, kiun mi havis la plezuron akcepti en mia hejmo antaŭ du jaroj, atendis min por viziti iun simpatian samideanon en proksima vilaĝo.

Trovi veturilon al tiu vilaĝo estis la unua malfacilaĵo; finfine iu veturilaĉo kiu reheimigis kelkajn vilaĝaninojn post ilia semajna (aŭ monata?) banpurigado en la publika urbeto banejo, akceptis nin kaj ni povis atingi la domon de Sro Wei Chi, eble la sola terkulturisto en tuta Ĉinio kiu scipovas la internacian lingvon.

Vidinte mian kameskopon, Sro Wei tuj anoncis al mi ke mi estis "bonŝanculo" ĉar iu maljuna vilaĝano ĵus mortis kaj tiel mi povus filmi la enterigan ceremonion...

La tago estis plene okupita: krom la enterigo, mi ne povis eviti la viziton al la loka templo kaj ni pasigis kelkajn horojn (kaj kelkajn kilometrojn piede) serĉi telefonon ĉar ni absolute bezonis kontakti nian amikon Wang por la sekvo de nia vojaĝo. Mi esperis ripozi trankvile vespere kiam alvenis post vespermanĝo, la poliestro kiu afable invitis min viziti ian najbaran fabrikon: malgraŭ mia laciĝo, mi ne povis rifuzi ĉar la sola telefono per kiu ni povis telefoni posttagmeze estis tiu de la policoj!

La sekvantan tagon, nia amiko Wang alvenis ĝustatempe per la aŭtomobilo kiu devis konduki nin al la najbara provinco Gansu kie atendis nin la lokaj samideanoj.

Mi estis, je la alveno, post 300 km da malkonforta veturado, mortlaca. Sed iu fabriko de jadaj (medicinaj!) kusenoj atendis nian viziton: tiuj kusenoj, laŭ la reklamilo, estas plenaj da kvalitoj: ĝi havus efikon kontraŭ kapdoloro, vertigo, sendormemo, neŭrastenio, arteria hipertensio, cerba arteriosklerozo. Ĝia konstanta uzo, laŭdire, kapablus forigi vizagsulketojn, plifortigi la memorphovon kaj inteligentecan, nigrigi blankajn harojn, ktp... Mi kompreneble ne povis reveni hejmen sen tiu mirindaĵo, sed mi ne ankoraŭ konstatis mezureblan rezulton. Miaj blankaj haroj ne ankoraŭ nigriĝis kaj mia modesta inteligenteco ne estas pli klara.

Malgraŭ mia gripo, mi devis ĉeesti plurajn bankedojn, agrablaĵoj kiam oni bonfartas sed kiuj fariĝas malfacile elteneblaj kiam oni malsanas: mi devis tosti kaj tosti... kiam mi nur sopiris al lito.

Sed ĉio atingas sian finon kaj post kelkaj tagoj, ni revenis al Xi'an kunportante ne nur la miraklan kusenon, sed ankaŭ semojn de akvomelono selektitajn de iu esperantista agronomo de tiu loko. Se iu leganto ŝance estas kulturisto de akvomelono, mi povas donaci al li semojn de tiu nova specio. Mi

mem semis kelkajn en mia ĝardeno sed mi forte dubas ke ili kresku ĝis matureco.

Ree do en Xi'an, ni decidis, Wang kaj mi, iri al Tibeto per flugilo (duonintence iri ĝis la piedo de Everesta Monto) el Chengdu. Bedaŭrinde, pro diversaj kialoj (necese atendi specialan permeson) ni rezignis kaj ni ne mankis konatiĝi kun kelkaj esperantistoj el Chengdu, precipe kun iu lerta masaĝisto, Sro Tu Jianyi, kiu faris sur mi mem brilan demonstradon de sia arto. Mi povas diri ke, se mi suferintus ian ajn malsanon dependantan de masaĝo, mi certe estintus sukcese kuracita. Bedaŭrinde, masaĝo ne estas tre efika kontraŭ gripo.

Forlasinte la intencon iri al Tibeto, ni decidis viziti iun Tibetanon kiun ni renkontis lastjare en Lhasa kaj kiu invitis nin en lia vilaĝo en la altaj valoj de la provinco Yunnan.

Post longa veturado, per ne tre komfortaj aŭtobusoj, ni atingis la ĉefurbon de la gubernio, kaj post iom da serĉado, ni sukcese trovis iun kiu povis konduki nin al la vilaĝo. Nia tibeta "amiko" estis for sed liaj gepatroj afable akceptis nin en ilia bela domo kiu tre similis al niaj montaj lignaj domoj.

Kompreneble, ne estas imageble ke iu Tibetano ne oferu la famajn teon kaj "campaon" al gastoj kaj ni ne povis eviti tiun "aflikton". La preparo mem ŝajnis al mi ne tre apetitiveka: la miksaĵo de teo kun salo kaj butero ne tre allogis min kaj pri la "campa": temas pri bruna faruno kiun oni mem knedas rekte en la mano (ne bezonas ke la mano estu pura!) kun iom da teo. Mia amiko Wang ne maltemis rifuzi kaj kuraĝis trinki du tasojn da teo kaj manĝi la "campaon": mi ne havis tiun kuraĝon kaj mi esperas ke niaj gastigantoj ne maldpardonis min pri tio.

Io multe frapis min ĉe tiu tibeta vilaĝano, simpla bredisto: lia religio. Krom akceptosalono preskaŭ luksa, lia domo posedis vastan ĉambron dediĉitan al Buddha kun bela altaro, ian veran "kapeleton"...

Kvankam pli aŭ malpli malsaneta pro mia gripo, mi ne suferis pro la alteco (tiu alta valo troviĝis je 3800 m) kaj ni povis iom promeni en najbaraĝo, admiri la belan pejzagon de tiuj himalajaj montaroj. Do, promenante en la cirkauaĵo de la vilaĝo, ni renkontpasis iun tibetan vilaĝanon kun kiu ni interŝanĝis kelkajn parolojn kaj nia gastiganto rimarkigis ke tiu tibetano tute ne aspektis tibeta, kaj fakte, kvankam li estis vera tibeta vilaĝano, lia vizaĝo aspektis eŭropana. Kaj nia gastiganto klarigis al ni ke tiu viro estis forlasita kiel bebo en ĉi-tiu vilaĝo antaŭ 68 jaroj, de iu eŭropana (franca, germana, nederlanda aŭ alia, neniu sciis) paro. Stranga sorto!

La reiro al la ĉefurbo donis al mi okazon uzi novan transportilon. Mi, ĝis nun, uzis flugilon, aŭtobuson, biciklon, ŝipon, motorciklon, taksi-biciklon, sed ĉi-foje, kontraŭ 10 juanoj, iu vilaĝano akceptis nin en sia trenveturilo, kaj ni atingis la ĉefurbon sidante sur amaso da sablo kion li transportis al la urbo.

Ni revenis al Lijiang kiun mi jam vizitis antaŭ pluraj jaroj: mi ŝatas reveni al lokoj kiujn mi jam vidis ĉar ĉiufoje mi malkovras aĵojn kiujn mi forgesis aŭ preterpasis ne vidinte ilin. Se la impona statuo de Mao-Ze-Dong ankoraŭ utilas al kolomboj kiel starstango sur la ĉefa placo, mi ne komprenas kial mi ne rimarkis lastfoje en la vendejoj la bongustan blankan teon, la "teo de la negoj" laŭ la nomo, kiu kuracas multajn malsanojn....

La urbo Dali estis nia sekvanta celo, Dali kaj ĝia marmora ŝtono, ĝiaj tri pagodoj, ĝia bela lago kiun mi ne mankis viziti, por rigardi fiŝkaptadon fare de kormoranoj.

Dum tiu tempo, apogeis la priklado (*repiquage*) de rizo kaj mi povis detale observi la penigan laboron. Se la plugado kaj la erpado (*hersage*) estas afero de viroj, nur virinoj kapablas tutan tagon piednude en ŝlimo alliniigi (*aligner*) vicojn da rizplantoj : rigardante tiujn gelaboristojn, mi promesis al mi ne plu malŝpari unu solan grajnon da rizo kiel mi tro ofte faras.

Tri tagoj da laciga veturado en kadukaj aŭtobusoj kondukis nin al la plej suda parto de Cinio, en Yunnan-provinco. Mi jam vizitis tiun regionon antaŭ multaj jaroj kaj mi ne restis longe tie. Iu litaŭtobuso revenigis nin al Kunming, la urbo de eterna printempo. Venis la tempo por mi pensi pri reheimiĝo kaj kelkaj horoj da flugado sufiĉis por revenigi min al Guangzhou, tio estas Kantono, ĉefurbo de provinco Guanddong, kaj de tie mi senprokraste ekveturis per trajno al Shenzen, la limurbo. Tie atendis min ne antaŭkalkulita malagrablaĵo : kiam mi prezentis min trankvilanime al la ĉina limpoliciisto, tiu lasta ordonis al mi returnen iri, car mia vizo ne plu validis ekde unu semajno : mi stulte forgesis plilongigi ĝin ĝustatempe. Post longa atendo ĉe la centra policejo, kaj pago de monpuno je 1000 HongKongaj dolaroj, mi finfine ricevis la permeson forlasi ĉinan teritorion kaj atingi Hongkong : 12 horoj da flugado nun apartigis min de nia Normandio.

Pierre BERLOT
Mont St Aignan (76)

Pour ceux qui n'aiment pas les voyages "organisés"

Pour ceux qui aiment la liberté, les imprévus, quelques fatigues, le Docteur Berlot qui adore la Chine (il y est allé 10 fois) écrit :

"Por ĉiuj kiuj ŝatus fari interesan vojagon en Cinio, mi povas diri ke nia samideano Wang estas tute disponebla por akompani ilin (kontraŭ kompreneble ian kompenson) kaj okupiĝi pri ĉiuj praktikaj problemoj (loĝejo, trajno-aŭtobus-flugbiletoj ktp, je plej bonaj kondiĉoj). Mi povas rekomendi lin car li estas tute fidinda samideano".

Retenez déjà les dates des principales manifestations espérantistes qui auront lieu durant l'année 1996 :

81-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO : Ĝi okazos en belega urbo de centra Eŭropo: PRAGO (Ĉeĥa Respubliko) de la 20a ĝis la 27a de Julio 1996

Kongres-kotizoj en *Nederlandaj Guldenoj*: por individuaj membroj de UEA :

- ĝis 31/12/95 : 215 NG
- ĝis 31/03/96 : 270 NG
- poste : 324 NG

Petu alĝilojn kaj eventualajn informojn ĉe U.F.E. 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris.

Le congrès de SAT ayant lieu la semaine précédente à Saint Pétersbourg, il est donc possible de visiter successivement deux des plus belles villes d'Europe.

Profitez des congrès pour rencontrer vos correspondants.

NOVAJ ESPERANTISTOJ el Sankt-Peterburgo volas **KORESPONDI** kun vi kaj eble renkonti vin dum la venonta kongreso de SAT :

IRINA (38 j.) inĝenierino, ŝatas slaloman skiadon, tenison, vojaĝojn.
Irina Ryžova - prospekt Udarnikov 21-1-167 St-Peterburg 195279 Rusio

TANJA (49 j.) ŝatas vojaĝojn
Tanja Stepanova - Ulica Rustaveli, d 16, kv 116 St-Peterburg 195273 Rusio

OLEG (36 j.) laboristo en mekanika uzino - ŝatas turismon, skiadon, bicikladon, tenison, muzikon
Oleg Medov - Ulica Buharestskaja 152 -2 -352 St Peterburg 192289 Rusio

NADEĴDA - Instruistino pri muziko- Volas korespondi kun geesperantistoj (40-50 j.) kiuj praktikas artan profesion.
Nadeĵda Butuzova - Dekabristov 2/13-8 St Peterburg 190000 Rusio

Le Rédacteur fait appel pour recevoir vos articles. Même les débutants ne doivent pas hésiter.

Mia frizistino kaj Esperanto :

Lastfoje kiam mi iris al mia frizistino, mi parolis pri Esperanto: Mi opiniis ke ŝi eble povos glui aŝion sur ŝia pordo, sed... jam estis multe da aŝioj. Do, mi supozis ke ŝi diros: ne! mi ne havos sufiĉe da loko!... Sed tute ne!!! Si ja volis aŝion ĉar ŝi rakontis jenon al mi:

Iam, ŝi estis en Hispanio. Si parolis nek ~~hispanan~~, nek anglan lingvojn kaj Hispanoj ne parolis la francan! Subite Hispano demandis: "ĉu vi parolas esperanton?" "Esperanton, diris mia frizistino?" Ŝi ne komprenis la vorton.

Nu, per gestoj, per kelkaj francaj vortoj, oni eksplikis al ŝi ke Esperanto estas internacia lingvo... Nun, ŝi volus lerni esperanton (se ŝi havus sufiĉe da tempo). Pro tio, ŝi akceptis plezure mian aŝion kaj tuj trovis lokon por ĝi!!!

Danièle ORDONAUD

76 N.D. Gravenchon

Al Turismoficejo de Lillebonne, mi iris serĉi dokumentojn por mia norvega korespondantino. Ili kredis ke mi parolas norvegan lingvon. Mi diris : " Ne, mi ne scipovas la norvegan sed mi skribas en Esperanto" - "Esperanto?.. Kio estas Esperanto?" . Do mi klarigis tion; ambaŭ junulinoj estis mirigitaj kaj kontentaj. Poste, mi alportis propagandafiŝon kaj korarojn de E-Kursoj en Le Havre.

En Junuldomo, mi studas gitaron ĉiusemajne. Kaj tiel mi havis okazon paroli pri Esperanto. Mi povis surmeti esperantan aŝion meze de aŝiad-panelo.

Danièle ORDONAUD

Une autre idée de l'espéranto

ESPERANTO-INFORMATIONS
SAT-Amikaro

Une haute idée de l'espéranto

P R I E R E D ' I N S E R E R

Tout article du Service de Presse peut être reproduit, de préférence avec mention de l'adresse de SAT-Amikaro.

S E R V I C E D E P R E S S E

E S P E R A N T O - I N F O R M A T I O N S

67, avenue Gambetta, 75020 PARIS

Téléphone : 47 97 87 05. Télécopie : 47 97 71 90

Répondre téléphonique en dehors des heures d'ouverture. Permanence de 9 à 15 h du lundi au vendredi. Cours oraux (début octobre) et par correspondance (tout le reste de l'année), stages intensifs. Edition et fourniture de matériel de documentation, d'information et de lude pour la Langue Internationale espéranto. Service Librairie pour les adhérents.

SAT-Amikaro en Belgique et en Suisse :

BELGIQUE : Espéranto-Infor, Avenue Théo Lambert, 56, Bte 12, B-1070 Bruxelles

SUISSE : Mireille Grosjean, Rue du Temple 20, CH-2416 Les Bains

Directeur de la Publication : Sella, Imprimerie Spéciale SAT-Amikaro, CPPAP n° 56121.

Rédacteur : Henri Masson.

Supplément à SAT-Amikaro n° 504, août-septembre 1995

Une biographie du Dr Zamenhof, père de l'espéranto, la Langue Internationale :

L'homme qui a défié Babel

Son nom et celui de son oeuvre ont été attribués jusqu'à ce jour à un millier de rues, places, monuments, jardins et édifices publics dans pas moins de 55 pays. Et même à deux astéroïdes !

Bien peu de grands de ce monde ont réuni assez de mérites pour pouvoir prétendre à un tel honnimage sans frontières...

En 1959, à l'occasion du centième anniversaire de sa naissance, l'UNESCO a honoré sa mémoire en invitant les Etats-Membres à le célébrer en tant que "personnalité importante universellement reconnue dans les domaines de l'éducation, de la science et de la culture".

Accueilli comme un monarque dans différents pays, il ne se laissa pas envlver par les honneurs et ne trahit jamais son rêve d'enfance, devenu le seul but de sa vie : donner le moyen de se comprendre à tous les peuples de la terre. En 1909, quand un éminent ophtalmologue suisse voulut le proposer pour le Prix Nobel de la Paix, il s'y opposa avec fermeté malgré des chances réelles de l'obtenir.

Pourtant le nom et la pensée du Dr Ludwik Lejzer Zamenhof restent encore étrangers à beaucoup. Mis à part les innombrables espérantistes de tous les continents qui ont perpétué son oeuvre depuis un peu plus d'un siècle, de 1887 à nos jours, rares sont ceux, dans le grand public, qui connaissent l'extraordinaire parcours, le prodigieux destin du père de la Langue Internationale.

Le professeur Umberto Eco s'en est étonné :

Des éditeurs s'intéressent enfin aux multiples facettes de l'espéranto. Mais quelle est sa raison d'être ? La réponse est dans :

Le défi des langues

Du gâchis au bon sens

Un ouvrage de Claude Piron, ancien traducteur polyvalent de l'ONU et de l'OMS, chargé d'enseignement à la Faculté des Sciences de l'Education de l'Université de Genève. Etonnant, passionnant, édifiant, remarquablement documenté, magistral.

De l'anti-mythes dans votre bibliothèque.

Editions L'Harmattan, 5-7, rue de l'Ecole Polytechnique, 75005 Paris. 336 pages 135x215 mm. ISBN : 2-7384-2432-5.

170 FF en toute bonne librairie et au Service Librairie de SAT-Amikaro.

"Les gens perçoivent toujours l'espéranto comme la proposition d'un instrument. Ils ne savent rien de l'elan idéal qui l'anime. C'est pourtant la biographie de Zamenhof qui m'a enchanté. Il faudrait que l'on fasse mieux connaître cet aspect-là !..."

C'est maintenant chose faite.

René Centassi, ancien rédacteur en chef de l'Agence France-Presse, a eu l'idée de raconter l'histoire hors du commun de Ludwik Zamenhof après avoir publié avec le journaliste Gilbert Grellet celle, non moins remarquable, du pharmacien Emile Coué, dont il a remis à l'honneur la méthode de maîtrise de soi-même par l'autosuggestion consciente.

N'étant pas espérantiste lui-même, il a fait appel au concours de Henri Masson, secrétaire général de SAT-Amikaro (diffusion de l'espéranto dans les pays de langue française) et conseiller général de SAT (applications socio-éducatives et culturelles sur le plan mondial), pour qui la Langue Internationale est une source inépuisable de découvertes.

Les deux auteurs nous offrent une passionnante biographie, qui est aussi le récit d'une vie exemplaire. Ils nous font découvrir un personnage d'une dimension humaine sans égale en même temps qu'ils nous apprennent que l'histoire de l'espéranto naissant recèle une abondante matière à réflexion. De quoi surprendre plus d'un lecteur non averti.

Cet ouvrage de 408 pages inaugure une nouvelle collection des Editions Ramsay : "Le livre des mots".

Nombreuses sources bibliographiques, notes, index, photos, graphiques, adresses. Un ouvrage de référence dont la lecture est aussi agréable et captivante que celle d'un roman, unique en langue française.

Prix 139 F. En librairie à partir du 5 septembre 1995 et au Service Librairie de SAT-Amikaro pour les adhérents.

La recherche de la langue parfaite

par Umberto Eco,

professeur au Collège de France, auteur des romans à succès *Le Nom de la rose* (porté à l'écran) et *Le Pendule de Foucault*. Le regard d'un érudit à propos de la recherche de la langue parfaite.

Et que pense-t-il de l'espéranto ?

Edition du Seuil, collection «Faire l'Europe». 448 p. ISBN-02-012596-x



Un grand point d'interrogation ombre, précédé par les mots "De l'esprit critique dans l'enseignement à la critique de l'enseignement", tel est le titre d'une brochure de 24 pages 10x21 cm éditée par SAT-Amikaro.

Seul droit de réponse possible à un texte fallacieux publié dans un manuel de français pour le BTS à propos de la langue universelle, cette brochure peut être aussi un corrigé inhabituel à l'exercice concerné.

A faire connaître et à diffuser largement auprès des enseignants, des lycéens et des étudiants, des parents d'élèves, dans les centres de documentation et les bibliothèques. Prix : 3 F pièce + frais d'envoi pour 50 grammes chez SAT-Amikaro, 67, avenue Gambetta, 75020 Paris.

LA SITUATION FINANCIERE

Dans le bulletin n° 184 , la situation financière indique un avoir qui peut sembler confortable. Il en est ainsi parce que nous ne faisons presque rien en dehors de la parution de ce bulletin. Veuillez en outre comparer ces deux chiffres: Cotisations reçues: 2760 F-Dépenses pour le bulletin: 2919 F Vos cotisations - abonnements sont donc absolument indispensables; or en 1995, nous n'en avons reçu que 66 alors que nous adressons 140 bulletins.

Veuillez donc vérifier dans la liste ci dessous si vous avez bien réglé votre cotisation.

Gesinjoroj : Bataille, Berlot, Bessière, Boucher, Caron , Canu, Chalm, Claudel, Colombel, Couture, DeFrance, Deuff, Dubois, Duflo, Evrard, Féret A. et S., Gibaux J. et Y., Giordano, Guérault, Guerre, Guilmot, Guionie, Haulard, Huet, Jourdain, Helbert, Lebrun, Legros, Lehericey, Lemarchand, Leroy, Lévy, Loisel, Longuet, Magerel, Martin C. et M. , Mary, Masseron, Maurice, Mendès, Michaud G. et R., Michel, Millet, Moyon, Nardin, Noël, Ordonaud, Peltier, Pilet, Quillaud, Quillet, Rauch, Robiolle, Roblin, Rubin, Séry J., Séry S., Tailpied, Touileb, Verneville, Vivier

RESTADO EN SLOVENIO

@@@@@@@@@@@@@@@@

De la 9a ĝis la 15a de Julio , okazis la antaŭkongreso de la 68a SAT-kongreso en Predvdor.

Ni estis nur 20 gepartoprenantoj el 12 landoj.

Post flugvojaĝo, ni alvenis en Ljubljana kaj aŭtomobile (35 kilometroj), ni atingis nian hotelon.

Nia agrabla loĝejo estis apud ĉarma lageto, ĉe la piedo de Kamnikaj Alpoj. De tiu-ci, ni faris plurajn ekskursojn en famajn lokojn :

- BLED kun sia lago kaj fortikajoj (11a jarcento)
- Lago de BOHING ĉirkaŭita de la nacia parko de Triglav ; akvofalo de rivero Savica
- Kaverno de POSTOJNA ornamita per stalagmitoj kaj stalagtitoj kie ni vidis specialan vivestafon loĝintan nur ĉi-tie: "la homeskan fise-ton".
- LJUBLJANA : ni trapasis unu tagon en la ĉefurbo kie ankoraŭ estas diversaj arkitektaj konstruaĵoj kaj romantikaj pontoj super rivereto Ljubljanska.

Ĉiuvespere, estis prelegoj pri diversaj landoj: Slovenio kaj Kroatio, Brazilio, Ĉinio ktp...

Post tiu agrabla restado, ni trajnis ĝis Maribor. Post iu malfruo pro elektra trajn-paneo sekvante forta ŝtormo, ni alvenis al la domo de lernantoj kie ni loĝis dum la kongreso.

Ni estis proksimume 150 gepartoprenantoj el 27 landoj tra 3 kontinentoj. La temo de la SAT-kongreso estis "Tolero al minoritatoj". Pluraj prelegintoj klarigis la situacion de diversaj minoritatoj en diversaj landoj. Estas

tre aktuala temo.

Dum la lasta laborkunsido de SAT, la ĉeestantoj redaktis deklaron el kiu interalie estis kondamnita la franca registaro pro la intenco rekomenci atombombajn testojn ĉe Mururoa atolo.

La vesperoj estis vivigitaj de muzikistoj, folkloro grupo de dancistoj, teatra grupo....

Kongreso estas tre bona okazo paroli Esperanton; nepre iru al la venonta kongreso de SAT en Sankt-Peterburgo!

Marie-Line Jourdain
Chantal Millet

69a KONGRESO de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA:

Ĝi okazos en SANKT-PETERBURGO

De la 13a ĝis la 20a de Julio 1996

Kongreskotizoj por SAT-membroj: 280F ĝis 15/12, 340F ĝis 15/4, 420F pli poste por geedzoj, por junuloj, por gastoj, aliaj tarifoj.

51a kongreso de SAT AMIKARO

Ĝi okazos en ORLY (sed ne en la aviadilejo)

dum Pasko 1996. Petu informojn kaj aliĝilojn ĉe SAT

RENCONTRE RIK à Saint Martin d'ardèche:

Tous ceux qui s'intéressent à l'Espéranto et à la "Rika Metodo" sont invités à se retrouver en Ardèche du sud durant la période des congés scolaires de la Toussaint. L'essentiel des travaux pourront avoir lieu entre le jeudi 25 Octobre en soirée et le mercredi 1er Novembre dans l'après midi.. Cette rencontre est ouverte à tous, membres ou non du "Mouvement Jean", espérantistes ou non. Pour la durée du séjour, chacun voudra bien réserver auprès de "La Résidence des Gorges" 07700 St Martin d'Ardèche Tél. 75 04 61 82 et tenir informée Mme Paulette BASCOU, 21 rue de l'Espéranto 07777 Privas Tél. 75 64 10 49

U F E KONGRESO 96 Ĉieliro (Ascencion-16-19 an de Majo 1996)

Ĝi okazos en Villeurbanne

Petu programon kaj aliĝilon ĉu al UFE 4bis rue de la Cerisaie 75004 Paris, ĉu rekte al: LKK-UFE NACIA KONGRESO 7, Rue Major Martin 69001 LYON Tél. 78 83 67 08

Voilà une excellente occasion pour visiter LYON ET SA RÉGION (profitante bonan esperantistan etoson !)

NIA VIVO EN:

HEROUVILLE SAINT CLAIR: Le vendredi 11 Août Kimie Markarian a fait en Espéranto une présentation et une démonstration de calcul au moyen du Soroban ou boulier japonais. Depuis 1991, Herouville-Espéranto a reçu des conférenciers de: Lituanie, Lettonie, Roumanie, Malaisie, Angleterre, Pologne, Norvège, Voïvodine, Russie, Japon.

FECAMP : Pour l'année scolaire 94/95 ,nous avons accueilli 57 élèves pour une petite initiation à l'E-o. Depuis 1992, certains ont déjà participé, d'autres pour la 1ère fois. L'activité dure 1 heure. Alignée sur les vacances, elle s'étend sur 1 mois et demi par trimestre. En moyenne, ils auront effectué 5 à 6 heures d'Esperanto.

Ceux qui choisissent de reprendre cette "activité" d'une année à l'autre ou 2 ans plus tard, ont déjà acquis une petite base: repère du nom, de l'adjectif, du temps au présent, et sont plus sensibles aux caractéristiques prosodiques de la langue.

Pour chaque nouveau groupe, nous commençons la séance par une brève sensibilisation à la multiplicité des langues grâce à laquelle nous abordons l'origine de la création de l'E-o par ZAMENHOF. Nous évoquons sa jeunesse, son lieu de naissance et les raisons qui l'ont conduit à construire l'E-o. L'occasion est donnée de situer la Pologne sur une carte de l'Europe. Les enfants posent facilement des questions et s'étonnent toujours du nombre impressionnant de langues existantes ou ayant existé.

Le premier contact sonore avec l'E-o s'établit par un chaleureux "Bonan tagon!" D'autres fois, après la courte introduction, les enfants écoutent une chanson enregistrée. Le plus souvent: "Jen via mondo" accompagnant sur cassette le Junulkurso. Les enfants apprécient d'écrire eux-mêmes la date au tableau; ils souhaitent vite apprendre à compter. Ainsi, nous avons obtenu un beau succès avec un jeu de Loto au cours duquel ils ont pu apprendre énumérer jusqu'à 100 ! Chacun demande l'équivalent de son prénom. Ils participent très régulièrement à la "Paĝo de Infanoj" grâce au jeu proposé chaque trimestre par la revue ICEM-Espéranto. Ils reçoivent chacun un album illustré. A la fin de la séance, nous prêtons des ouvrages. Mais nous n'avons guère le temps d'exploiter la lecture effectuée à la maison. L'album de Tinĉjo est très demandé! Pour les récompenses, nous offrons des autocollants, des jetons, des enveloppes préimprimées... Nous veillons à ce que cette activité rayonne autour de l'école et vers d'autres lieux. Ainsi le journal de l'école Rabelais a fait paraître pour le N° d'anniversaire de l'écrivain quelques informations sur notre activité, dont la venue de notre amie espérantiste, Gaby Tréanton. Illustré de 3 superbes photos prises durant les séances, le journal de l'école contient un jeu intitulé "L'emploi de plusieurs langues, c'est aussi une surprise de Kinder!" Il s'inspire d'une notice multilingue figurant dans les oeufs en chocolat distribués par la marque Kinder. Nous avons proposé à cette société de mentionner ses recommandations en E-o puisqu'elle le fait déjà en 24 langues. Ce petit journal confectionné entièrement par les élèves a fait l'objet d'une diffusion extérieure de 14 exemplaires dont 1 pour la bibliothèque municipale. Mélanie, membre du Conseil Municipal d'enfants a proposé que soit porté sur la mappemonde et la colombe peintes sur la dalle en ciment du Front de Mer cette phrase: "LE PAYS DE L'ESPERANTO LE VOICI!" Jusqu'alors, cette proposition n'a pas été retenu. Jumelé avec le Conseil d'Enfants

de Putnok en Hongrie, nous pensons que les petits Fécampoïses auront besoin dans l'avenir d'utiliser une langue intermédiaire. Le hongrois n'est pas si facile. Un contact a été pris avec le journal EVENTOJ. Mélanie et ses camarades se sont rendus à Putnok. Faute de temps, nous n'avons pas eu la possibilité de préparer un témoignage de l'activité espérantiste à Fécamp qu'elle aurait pu remettre à des espérantistes hongrois de la région visitée. Projet certainement prématuré, car nous ne disposons pas encore de l'appui de membre du Conseil Municipal (adultes) et la période des élections n'y a pas été favorable.

Nos séances sont réservées à des moments ludiques: jeux de dominos, loto des animaux, fiche "rondo da bestidoj", jeu télégra, repérer dans un texte court les noms, adjectifs, les verbes et les isoler, reconnaître 12 langues étrangères dont l'E-o, écoute de conversation courante à partir d'"amuzaj dialogoj". Notre participation à la kermesse annuelle le 24 juin pour la 2ème fois a été remarquée. Notre stand s'intitulait "Ecoute le Monde!". Y figuraient 2 jeux: un jeu de cartes où il s'agit de former le mot Esperanto; l'autre jeu, "Le tour du monde en 80 jours". Nous avons pu converser avec des parents curieux d'en savoir un peu plus et de faire découvrir l'existence de la langue à des enfants extérieurs à l'école. Pour l'ambiance sonore, le Directeur a accepté de diffuser des chansons de Nikolin', du groupe Team'Opus, de Tsaut

Nous avons confectionné un petit opusculé de présentation de l'E-o à l'intention des élèves et de leurs familles. Une vingtaine d'exemplaires a été distribuée. Il sensibilise les parents à l'alternative que représente l'E-o, apporte des arguments en sa faveur et des informations utiles. Un exemplaire a été remis au DIRECTEUR POUR l'équipe enseignante ainsi qu'un document "pour une méthodologie des langues étrangères". Les enseignants ne nous donnent pas leur avis. Cela nous manque. Ils pensent qu'il s'agit d'une activité culturelle comme une autre. Ils ne perçoivent pas encore, - mais cela viendra, l'intérêt que représente l'E-o pour l'approfondissement du Français! L'initiation aux langues étrangères prévue pour les élèves du primaire pose au Directeur surtout des difficultés de personnel compétent et de matériel. Une amie anglaise dont les enfants fréquentent la même école, a effectué une initiation à l'anglais; elle ne pense pas la reconduire car les élèves chahutent beaucoup.

Le responsable du Service Animation pour les 6 résidences de personnes âgées de Fécamp a eu la gentillesse de nous transmettre un article de presse datant de1948 consacrée à l'activité de la section espérantiste fécampoise, très active à cette époque. En avril, nous avons offert à la Bibliothèque Municipale les ouvrages de Claude Piron "Le Défi des Langues" et d'

Yvonne Lassagne-Sicard "Que vive la langue française et que vive l'Espéranto!" La bibliothèque les a reçu avec gratitude mais ils ne sont toujours pas en rayon (?). Notons que le "Que sais je" de Pierre Janton a été emprunté 4 fois !

Grâce à l'appui du Groupe d'Action pour l'Espéranto (GAE), nous avons apposé une cinquantaine d'autocollants en divers endroits de notre ville: boutique "artisans du monde", à laquelle nous avons confié notre adresse, bibliothèque, centre culturel et de loisirs, permanence d'accueil et d'orientation pour les jeunes, quelques cabines téléphoniques, bureau de poste, office de tourisme, église, pare-brise auto personnelle.... Nous les renouvelons. Un petit entrefilet devrait paraître dans un journal de quartier "Passe-Port" avec pour titre: "Une langue internationale, ça existe".

En diffusion nationale, nous avons répondu à des courriers de lecteurs dans OUEST FRANCE, au MONDE auprès de Mr J. de la Guérivière correspondant à Bruxelles à propos de son article "Babel à Bruxelles", à Mr Tardy de Cognac professeur d'allemand contacté ensuite par téléphone par Mr Moraud du GAE. Un courrier également à Mr Jospin dont nous avons copié d'une lettre qu'il a envoyé personnellement à une amie espérantiste de Perros-Guirec à propos de l'E-o. Pour extrait de notre courrier du 27 mai:

"L'école de la République défend les valeurs et le savoir universels. L'E-o a été reconnu par l'ONU et l'UNESCO ; il serait dommage que la France ne soit pas parmi les premiers pays à favoriser sa promotion et son essor au sein de sa jeunesse! Qu'en pensez vous??? En raison de son histoire, sa valeur propédeutique encore à découvrir et la portée de ses idéaux, l'E-o mérite d'être enseigné comme toute autre langue vivante. Et ce, de l'enseignement primaire jusqu'à l'Université. Ce serait un grand pas visible vers l'acquisition d'une conscience mondiale. Au cours de son cursus scolaire, chaque étudiant, citoyen du monde en germe, doit pouvoir être informé de l'existence de cette langue...."

Notre fils Tawfiq a fait paraître un petit article dans "Les clés de l'information juniors": "Bonjour, je m'appelle Tawfiq, j'ai 10 ans, j'habite Fécamp. Existe-t-il une langue universelle?"... Réponse du journal: "Oui, plusieurs langues universelles... La plus connue est l'E-o" créée par un Polonais Louis Lazare Zamenhof.

Comme l'année précédente, nous envisageons de participer au 3ème Salon d'Exposition de Matériel de Radio-communication du 28 au 29 Octobre. La présence amicale d'espérantistes normands à cette manifestation serait appréciée. Me contacter pour confirmation. Tél. 35 29 99 88

Mouloud TOUILLEB

NOTO DE LA REDAKTORO : Pro misfunkciado de komputero mi petas vian indulgon car mi devis reuzi antikvan skribmaŝinon !